

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL  
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE  
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE  
Peranto I.K.U.E: P-ro R. DEGRELLE 12, r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES  
C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====  
XX

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre  
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.  
XX

==== N° 159 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== DECEMBRO 1988 ====

XX

## BILETO DE LA PREZIDANTO

Après que Lourdes nous ait accueillis comme pèlerins pour notre rencontre annuelle, et que nous ayons remis ensemble entre les mains de Notre-Dame les intentions et les objectifs qui sont la raison d' être de notre mouvement, c' est à Nevers qu' il nous est proposé de nous retrouver en 1989. Près des reliques de Sainte Bernadette, nous prolongerons notre démarche. La petite bergère de Bartrès choisie comme confidente de la reine des cieus, humble et naïve messagère, a transmis le simple appel que des foules de chrétiens venus de tous pays pour l' entendre à leur tour: "PRIERE, PENITENCE", ont le devoir de porter partout avec l' esprit de l' Evangile.

Ainsi, Dieu se sert des humbles efforts qu' il nous demande et les fait fructifier au-delà de leur mesure.

En ce moment où se construit l' Europe, sur la base des intérêts communs, économiques, sociaux et culturels, le pape Jean-Paul II est venu devant le parlement européen proclamer comme il le fait à travers le monde que la dignité de l' homme et des institutions n' auront leur plénitude que dans la conformité avec l' enseignement de l' évangile de Jésus-Christ, comme sur la primauté des valeurs spirituelles.

Nous chrétiens, souvenons-nous que l' Europe est une affaire d' hommes de toutes les nations, dans le cadre universel de toutes les créatures à l' image de Dieu, liés par la solidarité de tous devant les problèmes, et que cela n' est pas uniquement la tâche des autorités mais le devoir de chacun de nous, de concourir à sa construction. Des relations à tous les niveaux entre les peuples de langues différentes vont se multiplier, et nous ne devons ni ne pouvons faire exception.

Quelle sera la langue commune qui permettra la communication, les échanges, les rencontres aux moments privilégiés vécus ensemble? Cette langue existe, elle est vivante, elle a manifesté sa vocation à être utilisée au service de la fraternité, de l' amour, comme de toutes les relations humaines; à l' exemple de

.../...

Bernadette, nous nous trouvons en présence d' un appel à une tâche dont nous ignorons l' ampleur, hors de proportion avec nos faibles moyens; Dieu nous aidera si nous consentons à y consacrer nos forces et nos peines.

R. Cl. COLAS

RESUMO

Dum nia pilgrimo en Lourdes, en 1988, nia Asocio konfidis la intencojn kaj la laborojn de sia membraro al la sankta Dipatrino. En 1989, ni invitas niajn anojn kaj niajn amikojn al komuna kunvivado en la urbo NEVERS, kie ni preĝos apud la sanktaj relikvoj de sankta Bernadette. Juna paŝtistino, simpla kaj mal-klera, ŝi estis elektita de la Ĉielreĝino por porti al la tuta kristanaro ŝian mesaĝon. Tiel, Dio uzas la malforton por instrui la popolojn.

Nun, Eŭropo strebas por fari sian unuecon inter la diversaj ŝtatoj, sur la bazo de komunaj utiloj, ekonomiaj, sociaj, kulturaj. Papo Johano-Paŭlo II-a venis al la eŭropa parlamento por proklami, kiel li faras dum siaj vojaĝoj tra la tuta mondo, ke la digno de l' homo, la fundamento de la homa progreso, de la universala frateco, de la solidareco kun la malriĉaj nacioj, troviĝas en la leĝo de Amo, en la evangelio de Kristo.

Nia propra tasko, kiel kristanoj kaj esperantistoj, estas aktiva partopreno en la konstruado de Eŭropo, per la rilatoj inter kristanoj diversnaciaj, diverslingvaj, eĉ se niaj rimedoj estas humilaj. Kiel Bernadette, ni iru, nesciante la amplekson de niaj celoj; Dio helpos nian malfortecon.

R.C.C.

+++++

KRISTNASKO

Iu stalo, iu kripo... kaj tie, en la silento kaj mallumo, la Infano kun sia patrino, Maria... Sed tiu Infano, tiu etulo, kiu ankoraŭ ne scias rideti, estas la dia Vorto "per kiu ĉio estis farita, sen kiu nenio povas fariĝi"...

Kaj ĉiuj anĝeloj adorkliniĝas antaŭ Li. Oni povas nur silenti antaŭ la nekomprenebla amo de la Patro, kiu sendas sian Filon "ne por juĝi la mondon, sed por ke la mondo estu savita".

Silenti kaj adori.

(Laŭ la revuo "Christ, source de vie")

+++++

LUMO

La birdoj ĉie tremas sub  
La malvarmega vento,  
Kaj la Ĉielo, sombra nub',  
Suferas kun lamento.

La pala sun'  
En nigra brun'  
Nun malaperas venkite;  
Morta veter':  
Ĝemu la ter'!

La nokto reĝas bandite.  
Fermiĝas zorge ĉiu kor',  
Fermiĝas ĉiuj pordojs;  
Kompato plore fuĝas for  
Sub la glaciaj mordoj.  
"Ĉiu por si!"  
Estas la kri'.

Nin la malamo invadas;  
Ĉirkaŭ la dom',  
Kaj en la hom',  
Lupoj kruelĉe hurladas.

Sed dum la nigro de la nokt'  
Falegas sur la mondon,  
Dum vipas hajlo kiel vokt'  
La povran vagabondon,

Venas anĝel'  
De la ĉiel'  
Kaj, en la granda atento  
De ĉiuj, li  
Kantas al ni  
Pri la miriga evento.

"Aperis lumo sur Eost'  
Dum ŝtorma furiozo,  
En vintro sur dorneja frost'  
Ekfloris juna rozo;

La dia man'  
Super infan'  
Ĝus etendiĝis kaj benas  
Dolĉa mister'!  
Ĝoju la ter'!  
Filo de Dio nun venas."

B. AUNIS

IOM PRI SANKTA BERNADETTE

Nia sanktulino Bernadette en Nevers devenas el tre malriĉa familio de Lourdes. Ankoraŭ eta knabino, ŝi devis iri en kamparan familion en apuda vilaĝo Bartrès por paŝti ŝafojn kaj foje varti bebojn. Tre frue ŝi sciis pri respondecujo, pri laboro, pri valoro de panpeco, kiu ne abundis hejme. Komprenoble, ŝi ne povis viziti lernejon nek kateĥismon; kvankam inteligenta, ŝi sciis nur la ordinarajn preĝojn, la rozarion. Kiam ŝi iĝis 14-jara, oni devis pripensi la Unuan Komunian, sed lerni iom da kateĥismo estis tre malfacile por knabino tute nenion lerninta, kun memorkapablo tiel malforta, ke ŝi tuj forgesis la ĵus lernintajn vortojn, ankaŭ malsanema, tia ŝi estis, kiam la Sankta Virgino vokis ŝin piede de la monto Massabielle. Poste la vivo estos eĉ pli malfacila por ŝia familio kaj ŝi.

Ofte kunvokita ĉe la policejo, ĉe la juĝistoj, ĉe la magistrato, ŝi respondis mirige saĝe; ŝi pli timis antaŭ la paroĥestro, iom severa homo. La ĉiela Vizitantino komisiis al ŝi postuli la konstruadon de kapelo, li petis signon kaj la nomon de tiu mirinda Sinjorino por akcepti tion.

Bernadette demandis plurfoje la belan Sinjorinon, tiel ŝi nomis ŝin. Ricevinte respondon en la loka dialekto, ŝi tamen ne povis kompreni la vortojn, ŝi ripetis la frazon laŭlonge de la vojo ĝis la paroĥejo, tie la severa homo aŭdinte tiujn vortojn ŝanceliĝis, kaj longe pripensis; tiu infano ne povis eltrovi mem, kion ŝi tute ne komprenis. Intertempe, la fonto mirige ŝpruciĝinte sub la fingroj de Bernadette apud la monto resanigis jam plurajn personojn, aliaj ŝanĝis la vivkonduton, tio estis ĉiela respondo.

Sekve de tiu afero, Bernadette estis konstante pridemandita de ĉiuj, kiuj vizitis la sanktan lokon. Spite de minacoj pri enkarcerigo, ŝi restis ĉiam serena, neŝancelebla; al tro incitema demando, ŝi respondis: "Mi estas komisiita diri tion al vi, sed ne kredigi ĝin". Iuj admiris ŝin, aliaj insultis, primokis.

La monaĥinoj de Nevers, kiuj havis tie lernejon kaj maljunulejon por tre malriĉaj homoj, akceptis ŝin en sia domo por lasi la familion pli trankvile vivi, labori kaj prizorgi la ceterajn infanojn. Ŝi rifuzis ĉian monon.

Iam la episkopo de Nevers vojaĝante al Lourdes demandis ŝin: "Kia vi farigosa?" Ŝi respondis: "Nenio". Kaj: "Mi taŭgas por nenio". Ŝi helpis en la flegado de la malsanuloj kaj deziris resti ĉe la monaĥinoj. Por tio ŝi devis iri al Nevers, iĝi monaĥino. Ŝia sanstato prokrastis la foriron al Nevers. Jam la homoj amase vojaĝis al Lourdes kaj deziris vidi Bernadette, do, plia argumento por foriri: "por kaŝiĝi".

En Nevers ŝia malsano devigis ŝin tre ofte ĉesti en malsanulejo; kiam ŝi refortiĝis, ŝi helpis la flegistinojn lerte kaj diligente. Ŝia karaktero estis laŭnature gajhumora.

Iom post iom ŝi devis resti kuŝanta, ŝi sufokis kaj haŭtvundoj en la lito tre suferigis ŝin, same kiel la osto-difektiĝo. Ŝia vivo estis longa malsana stato. Post la morto, la korpo kvazaŭ resaniĝis. Oni enterigis ŝin. Tridek jarojn poste, en 1909, oni elterigis ĝin kaj vidis ĝin en la sama stato kiel ĉe la enterigo. Oni reentombigis ĝin; dek jarojn poste, ĝi estiĝis en la sama stato. En 1929, oni elprenis ĝin el la tombo kaj metis en vitran ĉerkon, kie ŝi aspektas nur dormanta en juná e nedifektita beleco.

Ĉar ŝi lernis legadon kaj skribadon, ŝi laŭ ordono de sia superulino surpaperigis la tuton pri la aperoj de la Sankta Virgino; tiel restos la rakonto pri la ĉiela Vizitantino.

Malnovaj bildoj montras la monaĥinejon St-Gildard izolitan meze de kampoj kaj ĝardenoj; tio mirigas nun, se oni rigardas la densan trafikon sur la ĉirkaŭantaj vojoj. Sed tiel estis antaŭ jarcento kaj duono.

Sendis F-ino E. VANNEAU

NIA MEMBRARO

Nova membro 1988: 10) Pastro H. METZGER (Aube)

Tutkoran bonvenon en nia rondo al tiu plia sacerdoto. Li bonfartu inter ni!

\* \* \* \* \*

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO

Dimanĉon, la 23-an de oktobro, la kunveno komenciĝis je la 14.10 h, en la ĉeesto de S-ino Michau, F-to Marmou, S-roj Colas, Despiney, Lafargue, Pons. Petis senkulpigon: P-ro Bourdon, S-ino Vincent, F-ino Preux.

Post la preĝo Patro Nia, la prezidanto malfermas la kunvenon. La tagordo kaj raporto pri la antaŭa kunveno estas akceptitaj.

Pri la pasintaj okazaĵoj raportas la estraranoj. Nia pilgrim-kongreso en Lourdes bone sukcesis: 30 personoj partoprenis, ankaŭ nia standardo, kiu restis en Lourdes ĉe fidinda homo.

Dum la nacia kongreso en Rouen okazis nia kutima diservo fare de P-ro Bourdon. Ni klopodos aranĝi similan okaze de la venonta kongreso en Vichy.

S-ro Despiney raportis, ke la ekumena diservo en Roterdamo vekis diversajn impresojn; kelkaj ne ŝatis ĝin, ĉar ĝi tro distancis el la romaj direktivoj.

Kiel ĉiujare, grupo da esperantistoj partoprenis kun P-ro Bourdon en la pilgrimo al Banneux. Nia grupo estas nun bone konata; la kapelestro esprimis la deziron revidi nin venontjare.

Nia asocia kongreso okazos en Nevers de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1989 sub la lerta gvidado de F-ino Vanneau.

Post interŝanĝo de informoj pri la venontaj kongresoj, naciaj kaj internaciaj, la kunveno finiĝas per komuna kantado de religia kanto.

La venonta komitatkunveno okazos en Paris la 22-an de januaro 1989.

Protokolis: A. BESSIERE

oo

RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Finos sian mandaton en 1989:

P-ro Degrelle, F-to Marmou, S-roj Pons kaj Villeneuve.

Nia sekretariino (p. 1) petas ilian rekandidatiĝon kaj ankaŭ kandidat-  
iĝon de novaj anoj. Laboro de komitatano ne estas tre streĉa nek temporaba. In-  
ter niaj membroj certe troviĝas tute taŭgaj homoj; ili estu sufiĉe simplaj kaj  
kuraĝas por sin proponi. Temas pli pri amika klopodo ol pri administra afero.  
Ne timu, ĉiuj estas indaj "servi" la asocion. Ĉu vi venis en la mondon por nur  
esti servataj? Ĉu Jesuo ne diris: "Mi venis por servi?" Imitu lin kaj konkrete  
helpu vian asocion, iĝante kandidato je la komitato.

oo

GREKA PREĜO POR UNUECO

Tiu pano estis disa en la kampoj de la kamparo, kaj tiu vino en la vit-  
ejoj de la montoj. La eroj de pano kaj vino estis disaj en montoj kaj ebenoj.  
Sed ni rikoltis ilin kaj kunkolektis, kaj ili formas nur unu panon kaj unu vi-  
non.

Same, Sinjoro, kunkolektu nin, en via Eklezio. El homoj de ĉiuj rasoj,  
de ĉiuj landoj, de ĉiuj klasoj, faru unu kristanaron. El kristanoj de ĉiuj urboj  
kaj de ĉiuj vilaĝoj, de ĉiuj metioj kaj de ĉiuj familioj, faru intiman komunu-  
mon.

Plenigu nin per sankteco.

Igu nin vivi unuigitaj en via amo.

En la senfineco de via eterneco, Patro, Filo, kaj Sankta Spirito, vi estas unu Dio, en unu mistera Trionuo.

Same, Sinjoro, kunigu viajn filojn el ĉiuj rasoj kaj el ĉiuj landoj, el ĉiuj vilaĝoj kaj el ĉiuj familioj en vian vivantan Eklezion, unu kaj universa-  
lan. Plenigu nin per sankteco. Igu nin vivi unuigitaj en via Amo. Amen.

DIDACHE

oo

I.K.U.E.-MEMBRARO

- 37. DIATTA Alphonse (Sénégal); 38. DESPINEY Roger (Val de Marne); 39. VEILLARD Jean (Hauts-de-Seine); 40. GAILLARD Michel (Eure-et-Loir); 41. THIOLLIERE Eloi (Loire)

Estus bone se ĉiuj niaj anoj estusankaŭ anoj de I.K.U.E.

KOLOMBO, SIMBOLO DE PACO (daŭrigo)

Sed jen dimanĉe je la sama horo, 7. 30, kolombo jam svarmis en la kuintima placeto. Je la 7.40, ili interkonsentis flugi norden por renkonti sian nutrantinon. Je la 7.45, ili revenis, sed la virino forestis. Je la 7.50, hieraŭa tempo de matenmanĝo, ili subite forflugis ien suden. Evidente, ili terure ofendiĝis. Kial do homoj estas tiel malprecizaj? Je la 7.57, la virino aperis, sed komence ŝin atendis nur kelkaj flugiluloj... Iom post iom kolektiĝis ĉiuj. Ŝajnas al mi, ke tiumatene, ili estis malpli gajaj. Virino ja povis uzi servon de horloĝo... Dume ni ne povas ĝui tian trezoron... Kaj tamen ni ne malfruis...

Pasis 16 tagoj dum la kolombaj geedzoj sidas sur ovo-paro. La 25-a de majo estis ege malvarma. Tiumatene, la estonta patrino tute ne atentis panerojn kvankam ili estis nur je duonmetra distanco. Kaj mi, "saĝa homo", tute ne povis kompreni, kion tio signifas. La 26-an, estis eĉ pli malvarme; matene, la temperaturo estis eĉ sub nulo. La pacienca kolombino malsatis, sed la ovoparom ŝi ne forlasis eĉ unu minuton. Tiam mi metis telereton sub ŝian bekon, kaj ŝi ne plu forflugis sed avide ekmanĝis. Ŝi iomete levis unu flugilon, kaj tie mi ekvidis jam ŝelon de la ovo... Bonŝance mi ricevis permeson ekvidi novaĵon: sub la birdino estis unu birdido. Reveninte el la laborejo, mi vidis du birdidojn sub la ĝojplena patrino... Ĉu ŝi rajtas ĝoji kaj fieri? Certe jes! Ŝi tute forgesis ŝian malplenan stomakon. Ŝi ne rigardis termometron - inventaĵo de scienco kaj teĥniko. Ŝi nur sidadis pacience kaj, ŝajne, primeditis la ĉefan ordonon de Dio, donitan al ĉiu kreito: "Plimultiĝu, disvastiĝu, plenigu la mondon!" Kaj ĉu pri tio pensas iam ni - prudentaj edzoj kaj edzinoj? Ni ĉiam urĝegas plenigi niajn stomakojn, tute forgesante, ke tiumomente ni eble povus fari al nia proksimulo ion multe pli utilan.

(daŭrigota)

xx

UTILAJ INFORMOJ

1. La partoprenontoj al la kongreso en Nevers nepre kunhavu la Esperanto-kantikaron. Havebla ĉe la kasistino (p. 1). Prezo: 50 F afrankite.
2. Kurso pri Esperanto per komputoro, en 12 lecionoj. Informoj kaj vendkondiĉoj riceveblaj de C. BERTIN 60, allée de la Renaudière 35510 CESSON-SEVIGNE.
3. Mondkongreso de Monda Asocio pri Psikiatrio de infanaĝo kaj pri koncernaj sciencoj okazos en Lugano (Svislando) de la 20-a ĝis la 24-a de sept. 1989.  
Estus interese se partoprenus Esp<sup>o</sup>-parolantaj kongresanoj, kiuj povus alporti la pruvon pri la ekzisto de rekta interparola teĥniko. Estus eble organizi ion specialan por ili. Petu la informilon en angla-franca-itala de: D-ro Tazio Carlevaro Via A. Di Sacco 6 CH-6500 BELLINZONA (Svislando)
4. Bondezirkartoj kun plumdesegno pri Grésillon plezurigos viajn amikojn. Menu de la kasistino. Prezo: po 3 F + sendokostoj.

xx

LINGVA ANGULO

Multaj ne sufiĉe flue parolas Esperanton; urĝas, ke ĉiu plibonigu sian lingvoscion. Se iu ne bone regas la anglan kaj misuzas ĝin, oni nur diras, ke li ne sufiĉe regas la anglan. Sed se esperantisto misuzas la Lingvon Internacian, oni diras, ke Esperanto ne taŭgas kaj nenion valoras. La plej bona maniero disvastigi Esperanton estas uzi ĝin kiel eble plej flue kaj elegante.

Ĉu vi opinias, ke nova rubriko en nia bulteno kun la ĉi supra titolo utilis al vi? Ĉu vi havas lingvajn problemojn? Skribu al la redaktorino, S-ino Vincent, kaj ni kune provos solvi ilin.

xx

KONGRESO EN NEVERS

Jam de nun, P-ro Bourdon invitas la atentajn legantojn pripensi la kongresan temon:

"BERNADETTE, PAROLU AL NI PRI ESPERO."

DEFENDANTO DE LA KRISTANA MORALO

Devion de la kristanaj moralaj principoj, despiritigon de la socio kaj regadon de la materiaj valoraĵoj konsideris la franca verkisto Georges BERNANOS kiel ĉefan kaŭzon de la morala degenero kaj senĉesa malleviĝo de la individua kaj ĝenerala moraleco. Elirejon el ĉi tiu situacio li ~~xxxxix~~ trovas en renovigo de la "malnovaj" idealoj kaj en reveno al kristane konceptata honoro. La vivcelon de la homo li vidas en la batalo kontraŭ malbono, en la spirita lukto, en la fina puriĝo kaj la reaĉeto. La vojo al Dio estas malfermata per senkulpeco, pureco kaj per simpla beleco de la animo.

Georges Bernanoj naskiĝis la 20-an de februaro ~~xx xxxxx~~ 1888 en Paris. Post filozofiaj kaj juraj studoj, li travivas la tutan unuan mondmiliton en la milita fronto, el kiu li revenas profunde skuita. La profundan seniluziigon al li preparis ankaŭ postmilita ordigo de la mondo. Li sentis bezonon stariĝi kontraŭ morala konformismo, senprincipeco kaj kresko de la perforto en samtempaj totalismaj reĝimoj.

Li debutis kiel ĵurnalisto, sed kiel proza verkisto li famiĝis ĝis en la jaro 1926 pere de romana unuaĵo "Sub la suno de Satano". La libro vekis grandan atenton kaj per la literatura kritiko ĝi estis taksata kiel "verko laŭ la spirito de Pascal kaj Dostojevskij". Pri tio, ke ĝi efike alparolas eĉ la nuntempan mondon, atestas ankaŭ ĝia kinematografia prilaboro, kiu gajnis Grandan Premion dum la pasintjara filmfestivalo en Cannes.

Inter la plej konataj verkoj de Bernanos troviĝas la romano "Taglibro de kampara pastro"(1936), kiu primeditas la sencon de la vivo de soleca kaj forlasita sacerdoto, kaŝanta sub la kaduka korpa eksteriĝo eksterordinaran riĉecon de la spirita vivo. Eĉ ĉi tiu romano ĝisatendis sian filman version, kiun en la jaro 1950 surfilmigis la eminenta franca reĝisoro Robert Bresson.

Plia grava verko estas la romano "Morteca paroĥo", devenanta el la jaroj 1931-40, do el la tempo de aliranta faŝismo. En ĝi reflektiĝas antaŭtimoj pro la disvastiĝanta indiferenteco rilate al la kristanaj valoroj. En ĉi tiu malfacila tempo, Bernanos kuraĝe starigas sin flanke de Mauriac kaj Maritain kaj li malfermitece sin tenas kontraŭ la Frankisma perforto en Hispanujo. Li ne hezitis publike batali kontraŭ munkenaj kontraktoj kaj subteni la francan rezistan movadon "Grandaj lunaj tombejoj"(1938), "Skandalo pro la vero"(1939), "Humiligitaj infanoj"(1949).

La literatura verko de Bernanos pritraktas spiritajn konfliktojn, ĝi tuŝas fundamentajn ekzistoproblemojn, kaj pro tio ĝi ne lasas la leganton en trankvileco, sed ĝi alarmas lian konsciencon eĉ hodiaŭ, post forpaso de duonjarcento. En ĉi tio baziĝas ĝia daŭra societa aktualeco, kiel tion esprimas ankaŭ konsidero de la aŭtoro en la eseo "Humiligitaj infanoj": "Ne, miaj kantoj ne estas senmortecaj, sed tio, kion mi kantas estas senmorteca".

Georges Bernanos, kiun oni konsideras kiel unu el la plej signifaj katolikaj verkistoj de la 20-a jarcento, mortis la 5-an de julio 1948.

Laŭ artikolo de František Zeman en "Katolické noviny"  
nº 30/1988, tradukis Miloslav Svàček.

+++++

KASISTINA ANGULO

EM JARFINO LA DEVIZO: ZORGU MI PRI LA KOTIZO....

( El la Proverbaro de D-ro L.L. Zamenhof)

Mia decembra konsilo: parkere lernu ĉi tiun proverbon... kaj obeu ĝin!

Se ial vi ne plu deziras membriĝi, senprokraste avertu min; vi ŝparigos al mi kaj vanan laboron kaj senutilajn elspezojn. Mi antaŭe plej kore dankas vin ĉu pro demisia letereto (ho ve!), ĉu pro TUJA pago de la kotizo 1989 (v. p. 8)

Aldone, mi povas aserti al vi, ke la legado de la Proverbaro estas tre instruiga kaj plaĉa. Provu!

FKEA-KONGRESO EN NEVERS 29/4-1/5/1989

ALVENO: 29/4 matene se eble - FORVETURO: 1/5 posttagmeze.  
 PERANTO: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE  
 LOKO: Petit Séminaire 118, rue des Montapins 58000 NEVERS  
 KOTIZOJ: unuopulo: 50 F; geedza paro: 80 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, kriplulo, sacerdoto, religiul(in)o, alilandano, KELI-ano: senpage.  
 PAGOJ: Association Française pour l' Esperanto p.ĉ.k. ROUEN 2324 93 N.  
 LIMDATO: 15-an de aprilo 1989.  
 PREZO: 130 F por unu tranoktado kaj 3 manĝoj + 15 F por littukoj.

\* \* \* \*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 29/4: alveno de la kongresanoj  
 12.30: komuna tagmanĝo  
 16.30: prezentado de la temo "Bernadette, parolu al ni pri espero"  
 18.00: diservo  
 19.30: vespermanĝo  
 20.30: interkona vespero  
 Dimanĉon 30/4: 8.00: matenmanĝo  
 9.00: ĝenerala kunveno 12.00: komitatkunveno  
 12.30: tagmanĝo  
 14.00: vizito de la urbo  
 19.30: vespermanĝo  
 20.30: debato pri la kongresa temo  
 Lundon 1/5: 8.00: matenmanĝo  
 9.00: sintezo kaj konkludo  
 12.30: tagmanĝo DISIĜO

+++++

ALIGILO (limdato 15-an de aprilo 1989)

sendota al S-ino J. Vincent 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE

S-ro, S-ino, F-ino (1)

Adreso:

Naskiĝdato (nur por infanoj):

aliĝas al la kongreso laŭ la ĉi supraj kondiĉoj kaj pagas:

aliĝo	50 aŭ 80	.....
restado ... tagoj po	130 F	.....
littukoj	15	.....
urba vizito per aŭtobuso ĉ.	35 F	.....
donaco		.....
	Sume	.....

(1) Forstreku la senutilaĵojn.

Mi deziras ... fervojajn rabatilojn.

DATO

SUBSKRIBO

